

Tiu islandeco, kiun mi nomus ekskluda, ja elstaras. Tamen alia islandeco, inkluziva, estas la aromo, kiun ni povas flari: tiu de homo, kiu vagas tra la mondo kaj redonas tiun travagatan mondon en formo renovigita.

Ni povus glosi ĉiun poemon abunde kaj redunde pro la multaj aludoj kaj pro la transformoj, kiujn ricevas tiu ekstera mondo, kiam ĝi aperas al niaj oreloj kaj al niaj okuloj post tia metamorfozo, pro kiu ĝi ne plu estas la ekstera mondo, sed nova mondo poezie kreita. Ĉar, ne vane, la etimo de “poezio” signifas “farado”. Kaj kiel ni povus resumi en recenzo tion, kion nia matura poeto faras per siaj vortoj? La verko meritas enciklopedian komenton; nur poste oni povus resumi ideon pri la novaj teritorioj esploritaj en ĉi tiu plia aventuro de nesilentigebla poeto, kies verkaron mi emas nomi “neniam kompletigota”.

*Jorge Camacho*

## *Poeto vaste tolerema*

*Gerrit Berveling: Odoj & aliaj poemoj, VoKo, VoKo-serio nr 23, Zwolle, 2009, 51 p.*



Ĉi libreto konsistas el du partoj: *Odoj* (p. 7-25) kaj *Aliaj poemoj* (p. 29-43). Kiel Berveling klarigas sur p. 7, la vorto *odo* malhavas klaran kaj precizan signifon en Esperanto<sup>1</sup>. Li mem uzas ĝin por la sama formo uzita de Horacio en siaj *Romaj odoj*, nome por poemoj konsistantaj el strofoj kun ĉi tia senrime metrika aranĝo:

v-v-v-vv-v-  
v-v-v-vv-v-  
v-v-v-v-v  
-vv-vv-v-v

1 Sur p. 57 de BA16 (februaro 2013) A. Melnikov uzis la verbon “odi” kun la signifo “laŭdi”, kio ne multe kongruas kun la vortara aŭ la ĉi-poemara senco de “odo”.

Jen ekzemplo enhave daŭre aktuala:

*Palestinanoj dekojn da jaroj jam  
atendas realiĝon de propra ŝtat':  
sed kiu zorgas pri sen-naftaj  
homoj malriĉaj en tend-ĉifonoj?*

... prenita el la 21-strofa *Odo pri la Tria Mondmilito*<sup>2</sup> (p. 9-12), de 1991, jam aperinta en *Kanto pri Minotaŭro*<sup>3</sup> (kiun mi recenzis, ho!, ege severe siatempe por *Monato*<sup>4</sup>) kaj en *Mia pado*<sup>5</sup> (el la ceteraj poemoj, ankaŭ *Neniam promesis esti honesta* publikiĝis en *Mia pado*, dum la amuza kaj rimozita *La Muŝa Mondmilito* kantiĝis en disko de Kajto<sup>6</sup>). La plejmulto el la Berveling'aj odoj tamen konsistas el nur 5 aŭ 6 strofoj, t.e. el 20-24 versoj.

Ĉu kiel rezulto de la strikta aranĝo de akcentaj kaj senakcentaj silaboj, en ĉi tiaj odoj abundas unusilabaĵoj (ofte temas pri unuradikaj vortoj kun elizio, sed ankaŭ " 'stas" anstataŭ "estas"), jen sekvantaj unu alian, jen versfine kulpaj je neordinara vort-ordo, jen silabnombre kejlaj, kio foje impresas iom fremde, kvazaŭ temus pri esperantigoj de grekaj aŭ latinaj poemoj. Ekzemple, sur p. 16: "amo 'stas bild' de Di'!". Eble pro tio mi klare preferas la *aliajn poemojn* en ĉi kolekto, kiuj al mia malmodele malklasika orelo sonas ja pli flue kaj nature.

Nun pri la enhavo. Propradire, Berveling rezervas la odan formon "por iom seriozaj temoj". En 12 odoj (unu el 1991; 6 el 2003; 3 el 2008; 2 el 2009) ni trovas temojn kiel la du irakaj militoj kaj, paralele, la du Bush'oj (patro kaj filo); mortopuno; virinaj rajtoj; samseksamo kaj gejofobio; hipokrito kaj kanajleco; eĉ esperoj pri Obama (miaopinie troaj jam de la komenco de lia mandato, aŭ kredeble eĉ de pli frue)... La tempopaso provizas kelkajn el la poemoj per freŝe nova lego ĝuste nun, post la ĵusa kaj plua ondo da revolucioj en la arab-islama mondarbo. Entute temas pri poezio ne nur kritika kaj akuzita sed ankaŭ sin- kaj nin-demanda, profunde kaj vaste tolerema, iam kaj tiam ankaŭ spice aŭ amare ironia.

2 Tiel Berveling nomis "la invadon de la unua prezidento Bush en Irakon" (p. 47).

3 *Kanto pri Minotaŭro*, Flandra Esperanto-Ligo, Antwerpen, 1993.

4 Dec. 1994, p. 22-23.

5 *Mia pado*, Fonto, Chapecó, 1997.

6 *Tohuvabohuo*, kodoo (t.e. KD, kompakta disko), Flugdrako, 1993.

Kompreneble tio validas ne nur por la odaro sed ankaŭ por la dua duono de la libro, kie legeblas poemoj ankaŭ pri seksado (ne)laŭleĝa (“la vivo neniam promesis / esti honesta”, p. 33-35), pri am(or)o kaj belo, havemo, rilatproblemoj inter homoj, aŭ pri religiemoj, kultoj kaj dioj. Oni bonvolu legi sur p. 29 lian poemon *Frua Patristiko*, en kiu la interesaj bildoj kaj pensoj fluas libere kaj senĝene. Kaj, sur p. 25-27 de ĉi revuo, 5 novajn poemojn verkitajn de li.

Iuj vortoj bezonus klarigan noton: Malvinoj (p. 10; britoj nomas tiujn insulojn Falklandaj), muslimo (p. 21; sufiĉas diri “islamano”, vorto kiu cetere igas superflua ne nur la du-signifan “muzulmano” sed ankaŭ la nepre evitindajn “mahometano” aŭ “mohamedano”, krom se oni akceptas ke ankaŭ kristanojn oni alinomu jesuanoj aŭ jesuistoj), Alkibiado (p. 25; “Alkibiado” en la reta *PIV*), eŭnuĥo, birdrigardanto (p. 32; resp. eŭnuko, [bird-]aŭguristo), pasatismo (p. 46: paseisma, isisma?).

En la fina postparoleto *Pri mia verkado* (p. 45-47), Berveling skribas ke, jam de longe, li “studas kaj daŭre plu studas pri la Biblio kaj pri Klasikaj Lingvoj, kaj ĝuste ties kernajn mesaĝojn kaj belajojn mi provas transdoni al la homoj. [...] Konatiginte kun Esperanto [...] mi ekverkis – originale kaj traduke en ambaŭ direktoj: montri la mondon de la Latina kaj Greka, kaj montri la biblian mondon<sup>7</sup>. [...] Eĉ mia propra verkado iel apartenas al ĉi tio: mia poezio, kiu tuŝas ĉiujn temojn el nia realo, ofte uzas formojn tipe klasikepokajn.”

Iom pli frue en tiu sama teksto li asertas ke “preskaŭ nia tuta ĝisnuna esperantoliteraturo estas ĉefe amatora, kun kiel eble solaj esceptoj – laŭ mia gusto –: William Auld, Marjorie Boulton, Trevor Steele, kaj manpleno da aliaj samtempuloj, kiujn vi mem divenu”. Mi supozas do ke li mem ne konsideras sin poeto unuaranga, tamen la humanismo, humaneco kaj hom-amo en liaj poemoj igas lin verkisto leginda kaj atentinda.

---

<sup>7</sup> Oni vidu ekzemple liajn novajn tradukojn de la evangelioj (*La bona mesaĝo de Jesuo*, resp. *laŭ Johano, Luko; Marko, Mateo*) aŭ lian imponan *Antologio Latina*, de kiu aperis, en 2012, la 4a volumo. Listo de liaj tradukoj legeblas ĉe [esperanto.net/literaturo/autor/berveling.html](http://esperanto.net/literaturo/autor/berveling.html)